# *Prezidento de Kubo vizitas kvartalon en Havano*




**foto. Díaz-Canel vizitas havanan kvartalon La Federal**

Havano,  sep 2 (RHK) La unua sekretario de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Kubo kaj prezidento de la Respubliko, Miguel Díaz-Canel, vizitis ?i-vendredon la kvartalon La Federal, en la havana municipo Guanabacoa, por kontroli la transformojn tie evoluantajn.

En sia tvitera konto, la Prezidanteco informas, ke en ?i tiu komunumo de 800 lo?antoj, la prezidento emfazis la neceson ligi la pli ol 250 senlaborulojn al laboro kaj utiligi ?iujn kultiveblajn areojn por produkti man?a?ojn.

Díaz-Canel atentigis, ke ?io transformita en tiu teritorio devas esti prizorgata, inkluzive de konstruado de magazeno, panejo, ludejo kaj sportejo.

En La Federal anka? la vojoj estis plibonigitaj, esencaj servoj por la komunumo estis pliproksimigitaj, hejmoj estas le?igitaj kaj provizolibroj estas liveritaj, diras la Prezidanteco, aldonante, ke la najbaroj petas vendopunkton de likva gaso.

Fonto: ACN

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/298176-prezidento-de-kubo-vizitas-kvartalon-en-havano

RADIO HABANA CUBA

**Radio Habana Cuba**